

Germana Esperantisto

kun

Esperanto-Praktiko

Oficiala organo de Germana Esperanto-Asocio — (G. E. A.) — kaj de aliaj Esperantistaj Unuiĝoj
Amtliches Blatt des Deutschen Esperanto-Bundes E. V. und anderer Esperantisten-Vereinigungen

Elvenas en la komenco de ĉiu monato

Abonprezoj kaj prezoj por anoncoj estas ŝanĝeblaj; ili estas speciale publikigataj sur la unua kovrilpaĝo de ĉiu numero



Erscheint zu Anfang eines jeden Monats

Bezugs- und Anzeigenpreise sind veränderlich; sie werden auf der ersten Umschlagseite jeder Nummer bekanntgegeben

Fondinto: J. Borel — Ĉefredaktoro: Friedrich Ellersiek — Respond. redaktoro: Arnold Behrendt
Alsenditajn artikolojn ni korektas laŭ bezono. Nepresitajn manuskriptojn ni resendadas nur, se oni aldonis afrankojn por tio

21a Jaro No. 11 (345)

Eldonejo kaj redaktejo: Berlin SW61, Wilmstr. 5

Novembro 1924

La Plezuroj de la XVIa

Finiĝis la deksema festkongreso de la internacia Esperantistaro, veninta el ĉiuj partoj de la mondo, por glorie triumfigi la verkon de Zamenhof. Hele brilis la verda stelo, kaj malproksimen lumis ĝiaj radioj super la bela metropolo de Aŭstrio, kies gastamaj enloĝantoj donacis al ni neforgeseblan, gojan semajnon, for de ĉiutagaj zorgoj kaj laboroj.

Tro rapide pasis la tempo en agrabla ĉeesto de karaj *gesamideanoj*, ofte de longe ne plu renkontitaj, sed firme interligitaj per komuna celo; kaj dum kuna rigardado al la admirindaĵoj el la neelĉerpbla trezoro de la unika kongresurbo, ekkreskis novaj amikaj rilatoj.

Carma, aminda Wien! Ne sufiĉas mallonga restado ĉi tie en la „koro de Eŭropo“, por plene kompreni la kulturalan valoron, kiun produktis arto, scienco kaj industrio dum prosperantaj jarcentoj; tamen engravuriĝis profunde en la memoro neforigeblaj impresoj pri dolĉaj travivitaĵoj en tiu ravanta atmosfero, kreita per la harmonia kunfandiĝo de historia pasinteco, moderna komforto kaj serena naturo.

La aparta ideo de L. K. K., fiksi la daton por la solena malferma kunsido je la kvina tago post nia alveno, ja ebligis dediĉi pli da tempo ol ordinare al vizito de interesaj vidindaĵoj kaj amuzaj distrejoj. Tiamaniere ĉiu kongresano povis pasigi la horojn laŭ sia bonrovo, ĉu en amika rondo inter gaje babilanta homamaso, ĉu en idilia soléco sur la proksimaj montoj kun la grandioza panoramo al la vaste etendiĝanta urbo. Se unu rifuĝis en misteran duonlumon de gotika konstruaĵo, alia prefere restadis en la impona kongresejo, tiu favora areno por niaj pacaj batalantoj.

Preskaŭ embarasiga fariĝis la elekto inter la multspecaj allogaĵoj, rekomenditaj per bonega gvidlibro, al la fremdaj Esperantistoj, kvazaŭ la kongreso mem estis nur fono por la gaja Viena vivmaniero, kaj ofte okazis, ke pli aŭ malpli feliĉa cirkonstanco decidis pri kontentige pasigita tago inter la dissemataj membroj de la „granda rondo familia“.

Sajnas, ke la L. K. K. tro respektis la individuan memstarecon, lasante al ĉiu unuopulo tiom da

libero kaj la zorgon pri propra bonfarto en nekonata loko. Bedaŭrinde ekzistis nur malmultaj komunaj aranĝoj, kiuj donis okazon al pli intima alproksimiĝo, samtempe montrante al neesperantistaj observantoj konvinkantan bildon pri la potenco de monduiga ideo. Nur unu fojon impresis publike la heterogena kongresanaro kiel harmonia tutaĵo, t. e. per la solena inaŭguracio de la Zamenhof-tabulo ĉe la hotelo „Kammerand“, kaj per la posta fotografado antaŭ la monumenta urbdomo.

Sed ne estas mia tasko, kritiki la internajn aferojn de la XVIa; feliĉe la temo de mia raporto ja liberigas min de tia sendanka devo, kaj mi nun volas rakonti pri la eksterkunsidaj aranĝoj, nepre apartenantaj al la programo.

Tre edife komenciĝis la unua mateno per solena Esperanto-meso en la bela *Minoriten*-preĝejo. Multnombraj diversreligiaj homoj aŭskultis atente la aman predikon de itala franciskano, kies pasiaj vortoj profunde tuŝis la korojn kaj nerefuteble atestis la admirindan vivecon de nia lingvo.

Post multe da fakaj kunsidoj dum la sekvantaj tagoj ĝojigis nin niaj blindaj *gesamideanoj* en ĉambrego de *Konzerthaus* per bona muziko el la verkoj de klasikaj komponistoj, kiel Schumann, Brahms, Mendelssohn, Beethoven kaj Strauß. Fortepiana ludo, violonaĵo kaj kantoj alternis, kaj riĉa aplaŭdo rekompencis la fervorajn artistojn, ĝesinorojn *Lhotan*, *Kovačik*, *Neldner*, *Riedel* k. a. Dua granda festkoncerto okazis dimanĉon vespere en la vasta pompa salonego de la sama ejo. Sub la direkto de sinjoroj *Großmann* kaj *Spörr* eksonis plej dolĉaj tonoj. La solistoj *De Haager*, *Kramer*, *Neukirch* kaj *Loibnegger*, same kiel fame konata Viena horsocieto, entuziasmigis la nenombreblajn aŭskultantojn, kaj precipe la kantita „Blua Danubo“ de Strauß estigis nefiniĝantan tondran aplaŭdon, kiu devigis al ripetado de la sorĉa melodio.

Same brilan sukceson estus meritaĵaj la du prezentadoj de „La Malŝparulo“ en *Bürger-Teatro*; sed kio estas la kaŭzo, ke ĉi tiun tipe Vienan, duone gajan, duone melankolian dramon kun muziko de Raimund vizitis ambaŭ fojojn tiel malmultaj personoj? Estas doloriga fakto, ke la eminentaj

aktoroj, kiuj oferis tempon kaj forton, ne trovis pli da simpatio. Ĉiuj konkuris en plej perfekta ludo, kaj malfacile estas diri, kiu plaĉis plej bone al la ravita aŭditorio, ĉu la nobla Flottwell (s-ro *Zeska*), lia malica ĉambristo (s-ro *Kurth*), la bonhumora lignajisto (reĝisoro *H. Wawra*) kun sia incitema edzino (s-ino *Brenneis*) kaj la kvin petolantaj infanoj, ĉu la aliaj talentaj kunagantoj. Floroj kaj korega aplaŭdado de la venintoj esprimis la sinceran dankon por la interesa kaj ĝuplena prezentado, kiu finiĝis per ovacio por la artistoj kaj la lerta tradukinto de la teatraĵo, ekskolonelo *Zwach*.

La necesan ripozon, je kiu sopiras la homo post senĉesa spirita okupateco kaj laciga marŝado tra pavimitaj stratoj, ni trovis dum posttagmeza veturado sur la blanka vaporŝipo „Leda“. Sennuba blua ĉielo volbiĝis super la fruktodona lando, kaj hele brilis la arĝentaj ondoj de la „malgranda“ Danubo inter ĝiaj tieaj plataj bordoj. Preter domplenaj distriktoj, el kiuj bruas fabrikoj kaj moderna trafiko, glitis malrapide la ŝipo en la larĝan ĉefriveron. Afabla viena gvidanto klarigis ĉiujn gravajn detalaĵojn. Kaj kiu partoprenanto de la surakva ekskurso ne sentis dolĉan memoron, revidante la vilaĝojn Nußdorf kaj Grinzing, kie kompreneble ĉiu scivolemulo persone esploris la karakteron de l' famreputacia *Heurigen*, la nova orkolora vino?! Gaja humoro regis sur la ferdeko, kantoj eksonis, kaj en amika konversacio pasis ĉi tiu vere Esperantista, intima kuniĝo. Radianta suno lumigis la verdan pejzaĝon, kaj lasta rigardo flugis al „Kahlenberg“, la lim-monto de la Alpoj kun nesuperebla ĉirkaŭvido. Bedaŭrinde ne povis okazi la anoncita rondveturado, ĉar tro multe da akvo estis amasiĝinta kaj devigis la ŝipojn, uzi la rektan vojon returnen al la urbo.

En la lasta kongrestago kunvenis denove la verdstelanoj en freŝa libera naturo. Ĝardenfesto estis aranĝita en la mondkonata parko *Prater*, kaj multspecaj plezuroj prezentiĝis en la tielnomata „Varietea Urbo“ laŭ aparta Esperantista programo. Muziko, dancoj, kabaredaj spektakloj, ĉiuj imageblaj kaj neimageblaj artifikoj, plejparte adaptitaj al la naiva gusto de senkritike amuziĝanta popolo, daŭris de la 5a posttagmeze ĝis malfrua nokto. Neeble estis, rigardi ĉion, aŭ eble eĉ nur la iom pli valorajn prezentaĵojn; tro laca cetere estis la plimulto por ĝui ĝis la fino la mildan, stelumitan vesperon, kaj nur malmultaj horoj da ripozo restis por tiuj, kiuj deziris partopreni ankaŭ en la lasta kaj sendube plej sukcesplena kongresaranĝo.

Jam duonon post la 5a kolektiĝis ĉirkaŭe 120 partoprenantoj de la ekskurso al Semmering en la atendejo de l' suda stacidomo. Post laŭvola trinkado de bona Viena kafo ni estis liberigitaj de ĉiuj enuigaj klopodoj pri la materiaj bezonoj de l' tago; ĉar antaŭzorgema komisiono estis preninta sur sin la taskon, provizi ĉion necesan por tiuj, kiuj ĝustatempe aliĝis. Multe plaĉis ĉi tiu ideo, kaj danke oni akceptis la afablan helpon, kiu ankoraŭ plifortigis la plezuron pri la nedireble bela veturado tra la pentrinda regiono de la „Paradizo de la Alpoj“. Preter krutaj deklivoj, trans altajn pontojn kaj viaduktojn, kun ĉiam ŝanĝiĝanta perspektivo ni atingis post trihora amika kunesto en rezervitaj vagonoj nian celon: la ravantan refreŝigejon Sem-

mering. Du gvidistoj atendis nin ĉi tie por akompani la societon al vidindaj punktoj. Parto faris promenadojn, aliaj vizitis modele komfortan sanatorion. Mi mem preferis suprengrimpri ŝtonan kaj danĝeran vojeton al *Sonnwendstein*. Nur tri germaninoj havis sufiĉe da kuraĝo por elteni la penan marŝon al la 1523 metrojn alta montpinto, spite de diversaj ekpluvegoj. Sed, kian riĉan rekompencen ni trovis! Apenaŭ kelkajn minutojn ni sidis en la gastejo, froste tremante en niaj malsekaj vestaĵoj kaj iom seniluziĝite pro la malfavora vetero, kiam subite kvazaŭ feinaj manoj fortiris la grizan kurtenon antaŭ neimagebla, grandioza bildo. La nebuloj disŝiriĝis, kaj ora suno brilis super la paradiza pejzaĝo. Klare leviĝis sur la blua horizonto la majestaj montoj *Schneeberg*, *Raxalp* kaj aliaj neĝ-kovritaj gigantoj, dum malsupre etendiĝis la serena panoramo de *Semmering* kun la ĉarmaj konstruaĵoj en la verdaj arbaroj, kie floris kaj bonodoris genciano, diantoj kaj ciklamenoj.

Ne volonte ni deturnis la rigardojn de la admirinda spektaklo, kiu feliĉigis la sentemajn animojn, por precize ĉeesti la komunan kaj bonegan tagmanĝon en eleganta *Südbahnhotel*. Post mallonga promenado tra la arbaro la internacia rondo lastfoje unuiĝis en idilia *Meierei*, kie kafo estis mendita por ni. Muziko eksonis, eĉ laŭdaj paroladoj kaj ĝentilaj salutvortoj por sinjorino *Zamenhof*, kiu afable respondis, aŭdiĝis, kaj tro rapide forflugis la restaj horoj en la belega naturo. De *Wolfsbergkogel* ni forveturis, dum ekstere malheliĝis, kaj kiel fina surprizo, nenomita sur la programo, interesa luneklipso kaptis la atenton de silentaj observantoj.

Malfrue ni ree atingis la urbon *Wien* por forlasi ĝin la morgaŭan tagon. Negaja estis la disiĝo. Unuafoje mankis ja la konsolaj adiaŭaj vortoj pri ĝoja revido en la venonta jaro.

Tiom pli sincere ni danku al la organizintoj de la XVIa, kiuj havigis al multaj Esperantistoj neforgeseblan feliĉan tempon sub la verda stelo.

Margarete Küster

In eigener Sache

I. EIN BRIEFWECHSEL

Frankfurt a. M., den 8. Juli 1925
Bockenheimer Anlage 45

An

die Redaktion von „Germana Esperantisto“
Berlin SW 61, Wilmsstr. 5

Sehr geehrte Herren!

In der Juli-Ausgabe Ihrer Zeitschrift, die mir heute zukommt, befindet sich ein Artikel „An den Pranger“, der sich mit meiner Wenigkeit beschäftigt. Ich gestatte mir daher, Ihnen folgende Mitteilungen über den tatsächlichen Sachverhalt zu machen:

Nachdem der Erlaß des Herrn Preußischen Ministers für Wissenschaft, Kunst und Volksbildung vom 10. März 1924 bekannt geworden war, hat sich der Deutsche Ido-Bund unter dem 2. April an den Minister mit dem Antrag gewandt, den Provinzial-Schulkollegien mitzuteilen, daß dieser Erlaß die Erteilung von Ido-Unterricht nicht ausschließen soll, wo geeignete Lehrkräfte zur Ver-

fügung stehen. Am 1. Mai habe ich bei Herrn Ministerialdirektor Dr. Jahnke, der den Erlaß unterzeichnet hat, vorgesprochen. Man kann, nachdem unser schriftlicher Antrag bereits vier Wochen im Ministerium lag, wohl nicht gut sagen, daß ich mit der mündlichen Wiederholung des Antrages Herrn Geheimrat Dr. Jahnke überrumpelt hätte, und da Herr Dr. Jahnke der Unterzeichner des Erlasses gewesen ist und sich auch sonst in der Angelegenheit als durchaus unterrichtet erwies, so war ich auch zu der Annahme berechtigt, daß er der zuständige Referent sei. — Herr Dr. Jahnke hat mir gegenüber sich dahin ausgesprochen, daß nach seiner Auffassung der Erlaß des Ministeriums die Erteilung von Ido-Unterricht nicht ausschließen solle, wo die Voraussetzungen dafür gegeben wären. Der Antrag, den Provinzial-Schulkollegien gegenüber hierauf besonders hinzuweisen, werde im ordnungsgemäßen Geschäftsgang erledigt werden.

Nach dem Verlauf der Unterhaltung konnte ich nur annehmen, daß diese Erledigung in positivem Sinne erfolgen wird. Den Inhalt der Unterredung, der von Herrn Dr. Jahnke in keiner Weise als vertraulich bezeichnet worden ist, habe ich Herrn Dr. Jahnke mit Schreiben vom 3. Mai bestätigt und daraufhin erst unterm 24. Mai von ihm die Antwort erhalten, daß nach Rücksprache mit dem zuständigen Bearbeiter vorläufig das Ergebnis des Esperanto-Betriebs in den Schulen abgewartet werden müsse, bevor auch Ido zugelassen werden könne.

Inzwischen hatte der Deutsche Ido-Bund an alle Frankfurter Zeitungen und darunter auch an den General-Anzeiger unterm 5. Mai eine Nachricht gegeben, deren Originalkopie ich Ihnen zu getreuen Händen anbei übersende. Sie ersehen daraus, daß ich nichts berichtet habe, was nicht vollauf den Tatsachen entspricht, und daß die Fassung, die Ihr Mißfallen erregt hat, dadurch entstanden ist, daß die Redaktion des General-Anzeigers unsere Notiz zusammengestrichen hat. Dafür kann ich aber unmöglich verantwortlich gemacht werden, und ich zweifle nicht, daß Sie, nachdem Sie von Vorstehendem Kenntnis genommen haben, Ihre Vorwürfe an derselben Stelle zurückziehen werden, ohne daß ich Ihnen eine formelle Berichtigung zugehen lasse.

Es wäre mir erwünscht, wenn Sie mir dies bestätigen wollten, damit ich die Angelegenheit, deren weitere Erörterung wohl kaum im Interesse unserer gemeinsamen Sache liegen dürfte, als erledigt betrachten kann.

Hochachtungsvoll Dr. S. Auerbach

Frankfurt a. M., den 5. Mai 1924
Bockenheimer Anlage 45

An alle Frankfurter Zeitungen

Betr.:
Förderung des Esperanto-Unterrichtes

Wir erlauben uns, Ihnen anbei eine Abschrift des Erlasses zu übersenden, den der Preußische Minister für Wissenschaft, Kunst und Volksbildung unterm 10. März 1924 an die Provinzial-Schulkollegien gerichtet hat.*) Darnach soll dem Unterricht in der Weltsprache in jeder Weise Vorschub geleistet werden.

Hierzu möchten wir noch bemerken, daß der zuständige Referent im Kultusministerium, Herr Ministerialdirektor Dr. Jahnke, uns erklärt hat, daß dieser Erlaß im Zusammenhang mit dem vom 20. Mai 1923, von dem wir ebenfalls Abschrift beifügen, dahin aufzufassen ist, daß auch die Weltsprache „Ido“ gelehrt werden soll, wo geeignete Lehrkräfte zur Verfügung stehen.

Mit vorzüglicher Hochachtung

Deutscher Ido-Bund
(Germana Ido-Federuro)

E. V.

(Unterschriften)

Vorsitzender Schriftführer

* * *

Berlin, am 19. Juli 1924

Herrn Dr. Siegfried Auerbach

Frankfurt a. Main
Bockenheimer Anlage 45

Sehr geehrter Herr Dr. Auerbach!

Für Ihren Brief vom 8. Juli danken wir Ihnen bestens und bemerken dazu, daß wir keine Veranlassung sehen, die von Ihnen erwartete Berichtigung im Germana Esperantisto zu bringen. Unser kurzer Aufsatz beschäftigt sich mit einer Veröffentlichung des Frankfurter Generalanzeigers. Wenn wir eine Berichtigung bringen sollen, müßte zunächst eine Berichtigung im genannten Blatte erfolgt sein. Wir nehmen an, daß Sie, da bisher eine solche Berichtigung uns nicht bekannt, von Ihnen auch nicht mitgeteilt worden ist, sich vielleicht von der Schriftleitung des genannten Blattes eine Absage geholt haben. Die Unrichtigkeit der Veröffentlichung dürfte zweifellos Ihnen ebenso gut wie uns sogleich aufgefallen sein. Wenn eine Berichtigung im genannten Blatte nicht erfolgte, so bleibt nach unserer Ansicht der Frankfurter Generalanzeiger und der Einsender der Notiz, als den Sie sich ja selbst kennen, auch weiterhin verantwortlich.

Zu einer Berichtigung haben wir um so weniger Veranlassung, als das Hineinziehen der Ido-Angelegenheit nach Ihren eigenen brieflichen Ausführungen auf einer persönlichen Annahme Ihrerseits beruht.

Wir bedauern demnach, Ihren Wünschen nicht entsprechen zu können und zeichnen

hochachtungsvoll

Redakcio de Germana Esperantisto
F. Ellersiek Behrendt

* * *

Frankfurt a. M., den 18. Juli 1924

An die Redaktion von „Germana Esperantisto“

Berlin SW 61
Wilmsstraße 5

Sehr geehrte Herren!

Ich schätze Sie im Besitz meines eingeschriebenen Briefes vom 8. Juli und bedaure, darauf noch ohne Ihre Antwort zu sein. Da ich die August-Nummer von „La Germana Idisto“ abschließen muß, bitte ich Sie, mir die im letzten Absatz meines Briefes gewünschte Bestätigung umgehend zukommen zu

*) Erlaß ist in G. E. No. 4/1924, Seite 61, abgedruckt

lassen, so daß ich spätestens Montag in ihrem Besitz bin. Ich möchte, wenn irgend möglich, der Notwendigkeit enthoben sein, Sie an den Pranger zu stellen.

Hochachtungsvoll

Dr. S. Auerbach

* * *

Berlin, am 21. Juli 1924

Herrn Dr. Siegfried Auerbach

Frankfurt a. Main
Bockenheimer Anlage 45

Sehr geehrter Herr Dr. Auerbach!

Auf Ihr Erinnerungsschreiben vom 18. d. M. erwidern wir, daß unsere Antwort am 19. d. M. abgegangen ist; Ihr Brief ist erst nach Abgang unserer Antwort hier eingetroffen. Wir haben nur vergessen, die zurückerbetene Anlage beizufügen, was wir hiermit nachholen.

Sollten Sie es für nötig befinden, den im letzten Satze Ihres Briefes angekündigten Schritt zu tun, so würden wir gezwungen sein, in der darauffolgenden Nummer des Germana Esperantisto noch näher auf die Sache einzugehen. Wir würden dann auch weitere Fälle von sachlich-unzutreffender Ido-Propaganda, die uns vorliegen, in das rechte Licht rücken.

Hochachtungsvoll

Redakcio de Germana Esperantisto
F. Ellersiek

* * *

La Germana Idisto

Redakterio: Frankfurt a. M., Bockenheimer Anlage 45

Frankfurt a. M., den 22. Juli 1924
Bockenheimer Anlage 45

Redaktion des „Germana Esperantisto“

Berlin, Wilmsstr. 5

Sehr geehrte Herren!

Ihren Brief vom 19. Juli habe ich erhalten und bedaure Ihre Entscheidung außerordentlich. Ihre Konstruktion, daß ich für die Form, in der der General-Anzeiger die von mir eingesandte Notiz gebracht hat, verantwortlich sei, ist außerordentlich gesucht und berechtigt Sie nicht dazu, die Veröffentlichung der von mir erbetenen Berichtigung zu verweigern. Ich muß aus Ihrer Weigerung natürlich die Konsequenzen ziehen.

Nicht richtig ist, daß der Zusatz betr. Ido auf einer „persönlichen Annahme“ meinerseits beruhe. Vielmehr lag ihm die bestimmte Erklärung zugrunde, die Herr Dr. Jahnke mir am 1. Mai abgegeben hatte. Wieso Herr Dr. Jahnke später „umgefallen“ ist, kann ich Ihnen natürlich nicht sagen; Herr Dr. Jahnke selbst hat es mir bisher noch nicht erklären können. Die ganze Angelegenheit ist daher durchaus noch nicht als abgeschlossen zu betrachten.

Ich habe gar nicht daran gedacht, den General-Anzeiger um eine Berichtigung zu bitten. Sie wissen so gut wie ich, wie schwer es immer noch ist, die Tagespresse zur Aufnahme einer Notiz über Weltsprache-Angelegenheiten zu veranlassen, und wenn man ihr dann noch mit Berichtigungen kommen wollte, weil sie die Notiz etwas zu derb

zurecht gestrichen habe, würde man mit weiteren Berichten gar kein Glück mehr haben. Der General-Anzeiger hat aber Abschrift Ihres Artikels und meines Briefes an Sie vom 8. ds. erhalten, und ich sende ihm auch heute Kopie unseres Briefwechsels. Die Redaktion des General-Anzeigers wird sich danach selbst ein Urteil darüber bilden können, wer an den Pranger gestellt werden mußte, weil er aus System-Fanatismus den Gedanken der Weltsprache überhaupt schädigt.

Hochachtungsvoll

Dr. S. Auerbach

* * *

Deutscher Ido-Bund

(Germana Ido-Federuro) E. V.

Frankfurt a. M., den 24. Juli 1924

Redaktion von „Germana Esperantisto“

Berlin, Wilmsstr. 5

Sehr geehrte Herren!

Ihr Schreiben vom 21. Juli hat sich mit dem meinigen vom 20. Juli *) gekreuzt. — Ich bin durch Ihre Weigerung, eine Berichtigung aufzunehmen, leider gezwungen, in „Germana Idisto“ darauf hinzuweisen, daß Ihre Feststellungen auf falschen Voraussetzungen beruhten, und ich kann mich hiervon auch durch die in dem letzten Absatz Ihres Briefes vom 21. Juli enthaltenen Andeutungen nicht abhalten lassen. Ich habe mit Bezug auf meine Ido-Propaganda kein Licht zu scheuen, und wenn von anderen Idisten sachlich unzutreffende Ido-Propaganda getrieben wird, so finden Sie mich in der Bekämpfung derartiger Auswüchse auf Ihrer Seite **).

Wenn Ihnen weniger an einer unfruchtbaren Zeitungspolemik gelegen ist, als wirklich an der Abstellung von Mißständen, so würde es wohl das Zweckmäßigste sein, wenn Sie mir Kenntnis von Ihrem Material geben, da ich auf dem bevorstehenden Luxemburger Kongreß die beste Gelegenheit hätte, auf die Übereifrigen einzuwirken. Es soll Ihnen deswegen unbenommen sein, auf die betreffenden Fälle auch in Ihrer Zeitschrift einzugehen, wenn Ihnen dies förderlich zu sein scheint.

Auch in dem Falle, der zu diesem Briefwechsel Anlaß gegeben hat, wäre es meiner Ansicht nach zweckmäßiger gewesen, wenn Sie sich an den „bekannten Frankfurter Idisten“ gewandt hätten.

Ich kenne natürlich auch zahlreiche Fälle, in denen bei der Propagierung des Esperanto von der Wahrheit abgewichen worden ist, um Ido einzuzwischen. So hat sich z. B. die hiesige Esperanto-Gruppe vor kurzem in einem Rundschreiben die Behauptung geleistet, daß die Idisten den Erfolg der Esperanto-Übersetzung des Nitti-Buches zu nichte machen wollten. Wir haben uns darauf beschränkt, den Verlag des Buches darauf aufmerksam zu machen, daß diese Behauptung erfunden ist, denn von der Behandlung derartiger Dinge in der Öffentlichkeit können wir uns für die Förderung des Weltsprachegedankens nichts versprechen.

Hochachtungsvoll Dr. S. Auerbach

*) So in der Urschrift; gemeint ist 22. Juli
**) Die weiteren Briefausführungen treffen den zur Erörterung stehenden Fall nicht mehr und werden nur der Vollständigkeit wegen gebracht.

Schriftl.

Schriftl.

II. FORTGANG AUS „LA GERMANA IDISTO“ (Nr. 8/1924 Seite 76)

In eigener Sache!

„Germana Esperantisto“ Nr. 7 hat uns unter der Überschrift „An den Pranger“ angegriffen, weil eine Frankfurter Tageszeitung über den Esperanto-Erlaß des Preuß. Unterrichtsministeriums auf unsere Veranlassung unzutreffend berichtet habe. Wir haben der Redaktion von „G. E.“ nachgewiesen, daß wir richtig berichtet hatten, daß aber unsere Notiz durch Streichungen eine veränderte Form angenommen hat. Trotzdem lehnt „G. E.“ es ab, eine Berichtigung zu bringen, bevor eine Berichtigung in der betreffenden Tageszeitung erschienen sei; dafür seien wir verantwortlich!

Wir bringen diese Tatsache zur Kenntnis und stellen unseren Lesern den Briefwechsel mit „G. E.“ gern zur Verfügung.

III. FESTSTELLUNGEN

1. Am 1. Mai findet die Unterredung zwischen Herrn Min.-Direktor Dr. Jahnke und Herrn Dr. Auerbach statt; am 3. erfolgt ein Schreiben von Dr. Auerbach an den Erstgenannten, das als Bestätigung der Unterredung nur von einer Seite angesehen wird. Ohne dem Gegenüber genügend Zeit zu lassen, die schriftlich niedergelegte Bestätigung etwa zu berichtigen oder als inhaltlich richtig anzuerkennen, geht eine Nachricht an die Zeitungen bereits am 5. — Herr Dr. Auerbach weiß nicht, daß derart mit dem Inhalte von Unterhaltungen im Ministerium nicht verfahren werden darf. Herr Dr. Auerbach hält das, was nicht ausdrücklich verboten wird, für erlaubt.

2. Die Schriftleitung des General-Anzeigers in Frankfurt (Main) soll also der schuldige Teil sein; dort ist die übersandte Notiz zusammengestrichen. Wir können nicht nachprüfen, warum die Schriftleitung so gehandelt hat, zumal sie in einem Schreiben vom 5. Juli an die Prüfungskommission Köln des Esperanto-Instituts für das Deutsche Reich schreibt: „Auf Ihre Zuschrift erwidern wir, daß es sich um eine Notiz handelt, die jedenfalls amtlich ausgegeben war, die nachzuprüfen nicht unsere Sache ist.“ Also die Schriftleitung hatte den Eindruck, daß es sich um eine „jedenfalls amtlich ausgegebene“ Notiz handelt! Die Notiz des Herrn Dr. Auerbach hat diesen Eindruck erweckt. Herr Dr. Auerbach hielt sich für berechtigt, auf Grund einer schriftlich unbestätigten, mündlichen Unterhaltung im Ministerium eine Notiz zu versenden, die solchen Eindruck erweckt.

3. Die oben an zweiter Stelle abgedruckte Notiz ist an alle Frankfurter Zeitungen gesandt. Darin ist auf den Erlaß vom 10. März 1924 Bezug genommen. Wir hoffen, daß sich in der Abschrift kein Fehler beim Abschreiben eingeschlichen hat; sicher sind wir dessen nicht, wenn wir in der Notiz lesen: „Darnach soll dem Unterricht in der Weltsprache in jeder Weise Vorschub geleistet werden.“ In dem Erlaß steht klar und deutlich zu lesen: „... Unterricht in der Welthilfssprache Esperanto... Kenntnis dieser Sprache... Diesen Unterricht... Wesen des Esperanto und seine Bedeutung aufzuklären...“ Durch Auslassung des

für Herrn Dr. Auerbach allerdings nicht brauchbaren Wortes „Esperanto“ wird erreicht, daß ein Uneingeweihter nun unter „Welthilfssprache“ auch Ido zu fassen geneigt ist. Eine gröbere Irreführung ist nicht denkbar.

Herr Dr. Auerbach wird verstehen, daß wir nun entweder einen Abschreibefehler in der Abschrift des Erlasses vermuten — woher denn sonst: *Darnach* —, oder behaupten müssen, daß der eben angeführte Satz den Leser irreführt. — Herr Min.-Direktor Dr. Jahnke wird nach Ansicht des Herrn Dr. Auerbach — künftig sich jedesmal ausdrücklich verbitten müssen, in Notizen für Zeitungen mit Namen genannt zu werden! — Herr Min.-Direktor Dr. Jahnke hat *nicht* bestätigt, daß er das im Absatz 2 der eingesandten Zeitungsnotiz Angegebene gesagt hat. — Der Erlaß vom 20. Mai 1923 steht mit dem Erlaß vom 10. März 1924 nicht in dem von Herrn Dr. Auerbach gewünschten Zusammenhang. Und das weiß Herr Dr. Auerbach, denn er kann lesen!

4. Der Brief des Herrn Dr. Auerbach vom 22. Juli läßt fürchten, daß der Genannte unseren Brief vom 19. Juli nicht genau genug gelesen hat. Wir sagten, daß der Frankfurter Anzeiger und der Einsender der Notiz verantwortlich bleiben, sofern keine Berichtigung erfolgt. Das bleibt richtig.

5. Richtig ist, daß Herr Dr. Auerbach — obwohl der Brief vom 22. Juli sich dagegen wendet — *angenommen* hat, daß sich das Ministerium auch für Ido-Unterricht entscheiden werde. Das steht nämlich klar zu lesen im Brief des Herrn Dr. Auerbach vom 8. Juli!

6. Herr Dr. Auerbach hat gar nicht daran gedacht, eine Berichtigung zu verlangen! Vielleicht auch gar nicht die falsche Berichterstattung gleich gemerkt! Eine Notiz, die Herr Dr. Auerbach auf einer Unterredung im Ministerium aufbaut, wird falschen Inhalts gebracht, und der Herr Verfasser denkt gar nicht an eine Berichtigung. Wir fragen die Leser: Wie nennt man das? — Und wir stellen fest: Herr Dr. Auerbach nimmt Rücksicht auf die offen zu haltende Möglichkeit, auch späterhin in der Frankfurter Zeitung eine Notiz veröffentlicht zu können, aber stellt das Ministerium ohne Rücksicht bloß, indem er an eine Berichtigung der falschen Notiz gar nicht denkt!

7. Herr Dr. Auerbach macht uns Systemfanatismus zum Vorwurf, nachdem er aus Fanatismus für Ido ein Ministerium bloßstellte! Wenn Herr Dr. Auerbach nur vom Welthilfssprachengedanken beseelt ist, warum freut er sich nicht über den Erlaß und über alle sonstigen Fortschritte usw. des Esperanto? Denn das gibt Herr Dr. Auerbach doch wohl zu, daß durch Esperanto für den Welthilfssprachengedanken früher etwas geschah als durch Ido.

8. Herrn Dr. Auerbach haben wir nicht der Aufgabe entheben können, die er sich selbst stellte: uns an den Pranger zu stellen. Wir vermissen die Erledigung der Aufgabe durch Herrn Dr. Auerbach.

Oni sendu la manuskriptojn plej malfrue ĝis la 15a de ĉiu monato!!!

Esperanto-Movado

Raportoj por ĉi tiu fako estu sendataj ĝis la 15a ĉiunonata por la sekvanta numero (neniukaze pli malfrue!). La redakcio speciale preferas raportojn pri kursoj (ankaŭ en lernejoj!), publikaj paroladoj, grupfondiĝoj k. s. Malpli gravaj aferoj, ekz. festoj, ekskursoj k. s. povas esti citataj ĉi tie nur mallonge.

Mallongigoj: LG = Loka grupo de G. E. A., O = oficejo, P = prezidanto, VP = vicprezidanto, S = sekretario, K = kasisto, B = bibliotekisto, G = gvidanto de kurso, Pa = partoprenantoj.

Germanlingvaj Landoj

GERMANUJO

Aschaffenburg. *Esperanto-Club 1912.* Jarĉefkunsido kaj novelektoj: 27. 10. P: s-ro Carl Pfeiffer; K: s-ro Arnold Paul; S: s-ro Wilhelm Volck; Asistantoj: s-ro P. Jaworek kaj s-ino Volck. Nova kurso kun 6 Pa, G: s-ro Carl Pfeiffer. O: Restoracio Hajland Schwind, Roßmarkt.

Augsburg. 4. kaj 5. de Oktobro okazis sub la prezido de studprofesoro Lang, München, Esperantaj ekzamenoj. 6 gesinjoroj trapasis la kursgvidantan kaj 16 gesinjoroj la kapablecan ekzamenojn; tri el ili estas blinduloj. 5. de Okt. faris Dro Francke, München, paroladon antaŭ 150 geaŭskultantoj. 4. 11. komencos la popol-altlernejo Augsburg kurson, kiun ĉefinstruisto Beck gvidos.

Bamberg. Sup. poŝtkons. O. Reber gvidas ĉi-sabate kurson kun 17 lernantoj en supera reallernejo, ankaŭ de post 14. 10. ĝeneralan kurson en gastejo „Tambosi“. Kun la rektoro de filozof-teologia altlernejo li interkonsentis pri kurso de post 27. 10., ĉiulunde 4—5 ptn.

Berlin. Flatauers kaufmännische Privatlernejo (komercista privatlernejo de Flatauer), Berlin C 25 kaj Berlin-Neukölln, aligis al la entrepreno E-fakon havanta la nomon „E-lernejo de E-Gruparo Berlin“. Kursoj komenciĝis 1. 10., ĉiumerkrede 7—9 vespere. La lernejo faras ankaŭ grandan propagandon por E. — Berlin-aj radiogazetoj „Der Deutsche Rundfunk“ kaj „Radiowelt“ publikigas E-kursojn de telegr.-direktoro Behrendt. — La redakcio de gazeto „Der neue Kurs“ komencas E-kurson en sia oficejo Berlin C 54, Rosenthaler Straße 40—41. G s-ro Lothar Gebhardt. Daŭras 8 vesperojn. La redakcio korespondas en E.

— *Gruparo.* Laborkunsido 14. 10. en oficejo Wilmsstr. 5. Monata kunveno 21. 10. en kafejo Josty. Paroladoj de s-roj instruisto Tietsch pri „Augendiagnose“ (Perokula diagnozo) kaj Dro Hanauer pri „Organisation der Kongresse“ (Organizado de kongresoj). 18. 11. parolado de Dro Kliemke.

— *LG.* Kurso por komencantoj en Königstädtisches Realgymnasium. 8. 10.

Berlin-Charlottenburg. *LG.* Novaj E-kursoj en Städt. Wahlfortbildungsschule.

Berlin-Cöpenick. Kaufmännische Privatschule von A. Foitzick, Berlin-Cöpenick, aranĝis E-kursojn de post 8. 10., ĉiulunde kaj ĉiŝaŭde.

Berlin-Steglitz. *LG „Zamenhof“.* Kurso por komencantoj 8. 10. en komerca lernejo de Richter, Albrechtstraße 123.

Berlin-Tegel. *LG.* Merkrede kurso por komencantoj, vendrede por pliperfektiguloj.

Berlinchen (Neumark). Instruisto M. Luedtke komencis 9. 10. kurson kun 18 Pa.

Breslau. S-ro Habellok gvidas kurson en fervoja faklernejo kun 15 Pa kaj kurson en hejmo por metiaj lernantoj kun 10 Pa. S-ro Habellok, kiu ekŝiĝis el la fervoja servo, malfermis la lan de Oktobro sub la firmo „Schlesische Esperanto-Zentrale“ Esperanto-libro-vendejon.

Brinkum b. Bremen. 11. 10. propagandvespero aranĝita de grupoj Syke, Kirchweyhe kaj Vendreda Klubo Bremen. Parolis s-ro Heitmüller. Nova kurso 18. 10., 15 Pa.

Chemnitz. Supera ĉefserĝento Sende gvidas novan kurson por policanoj kun 30 kursanoj.

Dresden. *Loka Unuiĝo.* En la septembra kunveno parolis s-ro Wehlitz pri „Fotografado kaj fotografaĵo“. 28. 9. ekskurso al akvohaltigejo de Malter. 25. 10. ekskurso al Pulsnitz kaj Keulenberg. Ĉiŝaŭde kunvenoj de la klubo de sciencamantoj en stacidoma restoracio Dresden - Wettinerstraße. 29. 10. jara ĉefkunveno.

Eisenach. *LG.* 13. 10. parolado de s-ro K. Steier, Tabarz, pri „E, Esperantismo kaj mondlingva movado“. Komenciĝo de nova kurso.

Eltville. Kurso en Sept. kun 25 Pa, G s-ro Schönrich, Wiesbaden.

Erfurt. 30. 9. parolado de s-ro K. Steier pri „mondlingva problemo“. Nova kurso komenciĝos.

Euskirchen. *LG „Obstine antaŭen“.* Dum septembro du ekzercvesperoj. 22. 9. propagandvespero. 50 personoj ĉeestis. S-ro Hilger raportis pri la Wien-a kongreso, kaj s-ro Kind faris helpe de la demonstraĵaj tabeloj de Möbusz paroladon pri la gramatiko de E. 8 personoj tuj aliĝis al la grupo. Novaj kursoj en Oktobro, ĝis nun 48 Pa. La magistrato senpage disponigis lernejan ĉambbron.

Hamburg-Altona. *Loka Ligo.* 2. 10. parolis s-ro Ehlers (Unua grupo) pri „Ĉu oni bezonas perantan komerciston?“

Koblenz. *LG.* De post komenco de Septembro E-ekspozicio en la elmontrejo de P s-ro Stroh ĉe ĉefa strato. 8. 9. kurso por progresintoj, 6 Pa, 9. 9. por komencantoj kun 14 Pa. G de ambaŭ s-ro L. Funken. 13. 10. kurso por komencantoj, G s-ro Voltmer. La grupo ricevis la nomon „Rejn-saluto“.

Krefeld. Sup. instruisto Gießmann parolis pri E.

Leipzig. *E-Gesellschaft.* S-ro Kötz komencis 15. 9. kurson por progresintoj, f-ino Fenscky en „Werkseminar“ kurson por komencantoj. Samtempe la lastenomita faras kurson per radio je la „Leipziger Meßamtsender“, kiu estas akceptata per granda aplaŭdo.

Magdeburg. 26. IX. granda propaganda parolado de s-ro J. Glück el Berlin. La grupo ŝparis nek kostojn nek penon, por vekti la intereson de la ĝis nun indiferenta publiko. Impresaj afiŝoj ornamis la reklamkolonojn, kaj per ĉirkaŭ du mil leteroj estis invitataj la eminentaj kaj kleraj burĝoj de la urbo. Bedaŭrinde okazis la saman tagon diversaj gravaj politikaj kaj aliaj kunvenoj, krom tio aŭtuna foiro. Tial ni kontentiĝas, ke ĉeestis almenaŭ 200 personoj, kiuj atente aŭskultis la bonegajn kaj spritplenajn vortojn de la lerta oratoro. — „Magd.“

General-Anzeiger“ raportis detale kaj favore. La sama gazeto antaŭe publikigis sufiĉe longan artikolon pri E de Dro Ellerbeck el Berlin. Tiu ĉi fakto estas tiom pli menciinda, ĉar la lokaj ĵurnaloj ĝis tiam nepre silentis pri nia afero.

Bonan propagandon ankaŭ faris por ni la konata germana pacifistino f-ino Baer kaj s-ro Thivet el Paris, kiuj dum grandega manifestacio en „Hofjäger“, vizitata de miloj da diverspartianoj, insiste rekomendis la lernadon de nia helplingvo Esperanto.

Novan kurson kun 7 partoprenantoj, inter kiuj estas 3 instruistoj, komencis f-ino Küster. S-ro Wottrich instruas 32 knabojn de „Reallernejo“ kaj ilian studkonsiliston.

Niederoderwitz. La E-kurso por lernejoj infanoj finiĝis la 23an de Aŭg. kun 14 Pa. La kurso por plenkreskuloj estis fermata la 28an de Aŭg. kun 7 lernantoj. 6 el ili membriĝis. La grupo nun havas 17 membrojn.

Potsdam. La 29an de Septembro okazis en Potsdam propagandvespero, en kiu parolis direktoro Glück pri „la konstruo de Esperanto“, instruisto Dieu pri „Esperanto kaj la nuna tempo“ kaj instruisto Heinrich pri „Esperanto en la 4a jaro de la fundamenta lernejo“. Kurso en la popolatlernejo denove estas anoncita, kiun gvidos instruisto Markau.

Selb. LG. S-ro Pech el Pilsen faris lumbildparoladon pri la vidindaĵoj kaj naturbelajoj de Ĉeĥoslovakujo, Germanujo, Belgujo, Anglujo kaj Francujo, kiujn li travojaĝis dum sia libertempo. La parolado tuj estis tradukata germanen por konvinki la 300 ĉeestantojn pri la uzebleco de nia lingvo.

Stuttgart. LG. Nova kurso 8. 10. G prof. Christaller. — Aliaj kursoj 13. kaj 15. 10. en Jacoblernejo. — La laboruniĝo por komerca instruado akceptis E-n por la ĉi-jaraj kursoj. Komenco 29. 9. — En la junulargrupo de centra ligo de salajruloj oni aranĝis 31. 10. paroladon pri „E kaj interpopola fratiĝo“.

Wiesbaden. En Sept. komenciĝis kurso por instruistoj de la mez- kaj popollernejoj. 23 Pa. La administracio disponigis senpage ĉambron en liceo. S instruisto K. Schönrich.

Zittau. 5. 10. amika kunveno en Warnsdorf. 7. 10. monata kunsido. 15. 10. kurso en komerca lernejo de Herrlich. Alian kurson gvidas s-ro Knöfel.

LIBERA URBO DANZIG

Sukcesis al la penadoj de s-ro Aeltermann, gajni la direkcion de Danzig-a Internacia Foiro por E. Dum la IIa foiro (2.—5. 10.) oni eldonis flugfolion en E, kiu bone sukcesis en eksterlando. Nun aperis foirlibro en tri lingvoj: germana, pola kaj Esperanta. La direkcio intencas aranĝi apartan E-fakon kaj plie uzi E-n en la reklamo. La E-Asocio ricevis en domo „Oliva“ vastan ĉambron por E-ekspozicio. Pli ol 20000 personoj vizitis ĝin, ankaŭ multaj Esperantistaj komercistoj. Danzig-aj firmaoj komencis uzi E-n en korespondado kaj propagandaĵoj. La gazetaro favore raportis. Oni provas enkonduki nian lingvon en la lernejojn.

La grupvivo estas vigla. Ekzamenkomisiono por Danzig de la E-Instituto por la Germana Respubliko konsistas el s-ino Tuschinski kaj s-roj Majorkiewicz kaj Fethke. Kursoj en popola atlernejo kaj policiernejo daŭras.

ĈEĤOSLOVAKA RESPUBLIKO

(Germana Esperanto-Ligo)

Distrikto B.-Leipa. Vigla grupvivo en Haida kaj Langenau. En Kriesdorf finiĝis kurso. Grupo Warnsdorf festis la 15-jaran ekzistadon.

Distrikto Schönhengst. Grupo Landskron ricevis trian fojon de post du jaroj monsubvencion de loka kaj distrikta komitato por klerigado.

Distrikto Reichenberg. 20. 8. fondiĝo de grupo Kratzau. Laŭ invito de ambaŭ E-societoj vizitis s-ro Wan Kenn la urbon Brünn. S-ro Kenn parolis mallonge pri „Ĥinujo kaj ĝia popolo“. Granda sukceso.

Teplitz-Schönau. Post granda sukceso per artikolo pri la kuracejo en „E. T.“ la direkcio presigis E-broŝurojn.

Distrikto Karlsbad. 28. 6. parolado por 300 gejunuloj en Fischern apud Karlsbad. 22. 6. parolado en Münchhof apud Chodau, 29. 6. en Grünlas apud Elbogen, 21. 6. en Neu-Janessen apud Karlsbad, 3. 6. en Putschirn. En hotelfaklernejo Karlsbad oni akceptis E-n kiel instrufakon.

Distrikto Böhmerwald. 6. 7. fondiĝis grupo Pötschmühle, 27 membroj. En Lučenec-Slovensko fondiĝis E-soldata rondo.

Fremdsprachige Länder

Brasilien. In Rio de Janeiro wurde ein Esperantistenklub der Medizinstudenten gegründet, der Verbindung mit den Studenten der ganzen Welt aufnehmen will.

Pro baldaŭa informo mi dankus vin.

Estu certa, ke mi nur diskret-maniere uzos vian informon.

Se vi deziras detalan informon pri mia entrepreno, mi nomas al vi kiel referencon la Hansa-Bank, al kiu mi de multaj jaroj komerce rilatas.

Bonvolu uzi la ĉi supran informon tute konfidencie

La informo pri la firmo estas favora, malfavora-rezervema.

Ni estas indignitaj, ke la firmo X kuraĝis nomi nin kiel referencon, por doni informon pri ĝi.

informejo

informservo

deŝarĝi

Pro ekputriĝo de la oranĝoj la kestoj tuj devis esti deŝarĝataj.

Auslage

Machen Sie uns gef. Aufstellung Ihrer Auslagen, damit wir Ihnen den Betrag ersetzen können.

Wollen Sie die neuesten Erscheinungen in meiner Auslage beachten!

Beachten Sie die Auslagen in meinem Schaufenster!

Ausland

Bewerber müssen über gründliche, im Auslande erworbene Sprachkenntnisse verfügen.

Den Überschuß unserer Produktion versenden wir nach dem Auslande.

auslassen

Sie haben das Wichtigste in Ihrem Briefe ausgelassen.

elspezo, elmetejo

Bonvolu fari al ni kalkulon pri viaj elspezoj, kiujn vi havis por ni, por ke ni povu repagi al vi la sumon.

Bonvolu atenti la plej novajn elvenintaĵojn en mia elmetejo!

Atentu la elmetaĵojn en mia elmetejo!

eksterlando

Aspirantoj devas posedi fundajn, en eksterlando (eksterlande) akiritajn lingvosciojn.

La troon de nia produktado ni sendas eksterlanden.

Vi forgesis la plej gravan en via letero.

(Fortsetzung folgt)

Esperanto-Schule

Lehrgang für Anfänger; Lehrer: Behrendt

ZWEITE LEHRSTUNDE**1. Übersetzungsaufgabe (aus der ersten Lehrstunde).**

La¹ fiŝkaptisto Uraŝima vivis en² malgranda vilaĝo. Kiam li vivis³? Antaŭ pli multaj jaroj ol⁴ mi povas kalkuli. Ĉu⁵ li estis maljuna aŭ juna? Li estis juna viro. Ĉu⁶ Uraŝima estis lerta fiŝkaptisto? Jes, li estis eĉ la plej lerta fiŝkaptisto el⁶ ĉiuj en la vilaĝeto. Kial⁷ mokis lin¹¹ liaj⁸ kunuloj? Li neniam difektis beston¹¹, sed ĉiam klopodis, deteni siajn⁹ kunulojn¹¹ de tia agado. Kiam la fiŝkaptisto renkontis la infanojn¹¹ kun la testudo? Li renkontis ilin¹¹ en² somera vespero; jam estis¹⁰ krepusko. Kion¹¹ faris la infanoj? Ili puŝis la besteton¹¹ tien ĉi kaj tien¹² kaj batis ĝin¹¹. Kial la infanoj faris ĉi tion¹¹? Ili faris ĝin¹¹ versaĵne el infana krueleco.

1. Am Anfang eines Satzes und bei Eigennamen benutzt man große, sonst kleine Buchstaben. Man beachte: Ĉ Ĝ Ĥ Ĵ Ŝ; ŭ kann als großer Buchstabe nicht vorkommen, da es nur in den Verbindungen aŭ und eŭ möglich ist. 2. Das deutsche unbestimmte Geschlechtswort „ein, eine, ein“ bleibt unübersetzt. 3. Der Fragesatz beginnt mit einem Fragewort; im Deutschen wird der regierende Satzteil „er“ hinter das Zeitwort gestellt (lebte er); im Esperanto wird die folgerichtige Stellung möglichst beibehalten, daher kiam li vivis; durch e Wortstellung kiam vivis li? würde ein besonderer Ton auf li gelegt werden, was ja wohl hier und da beabsichtigt sein kann. Indessen gibt es für die Wortstellung im Esperanto keine Regel; man stelle die Wörter so, daß Zusammengehöriges zusammensteht und der Sinn leicht erfaßt werden kann. 4. Nach dem ersten Grad der Steigerung steht „ol“ = als; im Deutschen wird oft falsch „wie“ gebraucht. 5. Der Satz beginnt im Deutschen nicht mit einem Fragewort, ist als Frage lediglich aus

der Wortstellung erkennbar. Da im Esperanto die Wortstellung nicht an besondere Regeln gebunden ist, muß der Satz als Fragesatz gekennzeichnet werden; das geschieht durch das Wörtchen „ĉu“ = ob. 6. Nach dem zweiten Grad der Steigerung steht „el“ = aus; im Deutschen braucht man meist „von“. 7. Kial liaj kunuloj mokis lin? Wortstellung wäre ebenso richtig, wenn nicht Klanggefühl veranlassen würde, das Aufeinanderfolgen von l-l (kial liaj) zu vermeiden. Geschmackssache! 8. liaj — nämlich die Gefährten des Uraŝima; liaj kunuloj ist selbst regierender Satzteil. 9. ... bemühte sich, daß er seine Gefährten abhielte; „seine“ bezieht sich auf den regierenden Satzteil desselben Satzes (er ... seine ...), also sia. 10. Das deutsche „es“ vor dem Zeitwort braucht nur dann übersetzt zu werden, wenn es als Fürwort gebraucht ist: la infano estas sur la strato das Kind ist auf der Straße; ĝi ludas es spielt (nämlich „das Kind“ des vorhergehenden Satzes); „es“ steht also für (d. h. an Stelle) ein Hauptwort; [neĝas es schneit; pluvas es regnet]. In dem Satze „es war schon Dämmerung“ ist ein regierender Satzteil, nämlich „Dämmerung“, vorhanden, das Wörtchen „es“ kann entbehrt werden: „Dämmerung war schon da“ oder „schon war Dämmerung“. 11. Man baue vor der Übersetzung den Satz auf, mit dem Zeitwort beginnend; z. B. Warum verspottete wer oder was? Seine Gefährten (1. Fall; regierender Satzteil); warum verspotteten seine Gefährten wen oder was? Ihn (4. Fall). Auf die Frage „wessen?“ steht der 2. Fall, auf die Frage „wem?“ steht der 3. Fall. 12. Das „n“ der Richtung! — tie ĉi hier, tie dort. —

Uraŝima
(Daŭrigo)

Uraŝima sentis sin tre malĝoja pro la malfeliĉa testudo kaj decidis, ĝin liberigi. Li diris al la infanoj:

„He, infanoj, vi agas kontraŭ tiu ĉi testudo tiel malbone, ke ĝi tuj mortos. Ĉesu, infanoj, ne turmentu plu la besteton!“

La infanoj, kiuj estis pli-malpli egale en la aĝo, en kiu infanoj ĝenerale ŝatas turmenti bestojn, ne atentis la ĝentilan admonon de Uraŝima, sed daŭrigis sian kruelan agadon

kiel antaŭe. Unu el la pli maljunaj knaboj respondis:

„Kiun koncernas, ĉu ĝi vivos aŭ mortos? Ne malhelpu nin, sinjoro! Nu, kunuloj, daŭrigu, daŭrigu!“

daŭrigo	Fortsetzung
senti	fühlen, empfinden
tre	sehr
ĝoĵi	sich freuen (ĝoja fröhlich, malĝoja traurig)
feliĉa	glücklich
decidi	entscheiden
liberigi	befreien, frei machen (als Zeitwort gebildet aus libera frei und der Nachsilbe -ig-, die „in einen Zustand bringen“, „zu etwas machen“ bedeutet)
diri	sagen
vi	Ihr, Sie (als Anrede), Du
agi	handeln, tun
kontraŭ	gegen (Verhältniswort)
tiu ĉi	dieser, diese, dieses (auf Nahes hinweisendes Fürwort; ĉi bleibt unverändert; tiu jener, jene, jenes)
tiel	so
tuj	sogleich, sofort
mortos	wird sterben (Zukunftform von morti sterben; Zukunft wird durch die Endung -os ausgedrückt: kapti — kaptos, povi — povos, agi — agos)
ĉesu	hört auf, haltet ein (Befehlsform von ĉesi aufhören, einhalten; Befehlsform wird durch die Endung -u ausgedrückt: kapti — kaptu, agi — agu, diri — diru)
ne	nicht; nein (in der Antwort)
ne plu	nicht fernerhin, nicht weiter, nicht mehr
kiuj	welche (Mehrzahl des rückbezüglichen Fürworts; Einzahl: kiu welcher, welche, welches; kiu wird auch als fragendes Fürwort gebraucht: wer?)
pli-malpli	mehr oder weniger
egala	gleichmäßig (egale ist Umstandswort)
aĝo	Alter
ĝenerala	allgemein
ŝati	schätzen
atenti	aufpassen, beachten
ĝentila	höflich
admono	Ermahnung
daŭrigi	fortsetzen (als Zeitwort gebildet aus dem Zeitwort daŭri dauern und der Nachsilbe -ig- zu etwas machen; also: machen, daß dauert, d. i. fortsetzen); daŭrigo Fortsetzung
kiel	wie
antaŭe	vorher (Umstandswort, gebildet durch Anfügung der Endung -e an das Verhältniswort antaŭ vor)
respondi	antworten
koncerni	betreffen, angehen
helpi	helfen
ni	wir (nin ist vierter Fall: uns)
sinjoro	Herr

(Fortsetzung der 2. Lehrstunde folgt)

Übersetzungsaufgabe 5

Bearbeiter: Dr. Göhl

Am Wettbewerb der Übersetzungsaufgaben können alle Leser des Germana Esperantisto teilnehmen. Die Beteiligung ist kostenfrei. Die Lösungen sind bis zum Schluß des Erscheinungsmonats an die Schriftleitung einzusenden. Drei der besten Arbeiten werden mit Bücherpreisen im Werte von 0.50, 0.30 und 0.20 Goldmark bedacht. Wer bereits einmal den 1. Preis erhalten hat, kann außer Wettbewerb weiter teilnehmen und erhält, wenn er dreimal hintereinander die beste Arbeit geliefert hat, einen Sonderpreis im Werte von 1 Gm. Die Gewinne werden vom Verlag ausgewählt

Chirurgie im Mittelalter

„Ist eine Geschwulst beweglich, so schneide ich sie mit einem rotglühenden Messer weg, das zu gleicher Zeit schneidet und die Wunde kauterisiert; ist sie unbeweglich, so öffne ich die Haut mit einem Hornmesser, das in Scheidewasser gelegen hat, und drücke sie sodann mit den Fingern aus.“ So lehrte Fabricius von Aquapendente Ende des 16. Jahrhunderts zu Padua. Diese Operationsmethode läßt unzweideutig erkennen, auf welcher Höhe die ärztliche Kunst in jenen Zeiten stand. Als König Heinrich II. von Frankreich im Jahre 1559 während eines Turniers zwischen ihm und den Grafen Montgomery dadurch tödlich verwundet wurde, daß die Lanze seines Gegners splitterte und ein Stück davon in Stirn und Auge des Königs eindrang, ließen die ihn behandelnden Ärzte zunächst vier Verbrecher töten, indem sie ihnen ähnliche Lanzensplitter in Augen und Stirn stoßen ließen, um sich dadurch über die Beschaffenheit der Wunde des Königs klar zu werden. Heinrich V. von England hatte in der Schlacht von Azincourt auf ein Heer von 30000 Mann nur einen einzigen Arzt, zu dessen Beihilfe 15 Soldaten kommandiert waren. Doch mußten diese Soldaten in der Schlacht mitkämpfen, und erst nach Beendigung des Kampfes standen sie dem Arzt zur Verfügung. Als Lohn für seine Dienste erhielt der Arzt einen Schilling täglich. Während der Regierung Heinrichs VIII. gab es in ganz London nur 12 Wundärzte, die sich einer Prüfung durch den Dekan der St. Paulskirche hatten unterziehen müssen, ehe sie ihr Gewerbe ausüben durften.

Ergebnis der

Übersetzungsaufgabe 3 aus Nr. 5/1924

Eingegangen sind 18 Übersetzungen. Die besten Arbeiten haben geliefert: Herr L. Funken, Koblenz (außer Wettbewerb); Herr Heino Heitmüller, Bremen (außer Wettbewerb); Herr Alfred Flade, Chemnitz (außer Wettbewerb); Herr Willi Salzbacher, Honnef (1. Preis); Herr Barkhausen, Bremen (2. Preis); Herr Dr. Joh. Schweiker, Marktbibart (3. Preis).

La unua pluvombrelo

En antaŭaj¹ tempoj la plej multaj novaĵoj², eĉ³ se⁴ ili evidente signifis⁵ kulturprogreson⁶, estis rigardataj⁷ kaj akceptataj⁷ kun malfavora⁸ antaŭjuĝo, eĉ kun malamika antipatio. Sur la unuan vaporboaton (al la — a — o) sur (la) Rejno oni jetis⁹ ŝtonojn, kaj ĉe¹⁰ la unua fervoja konstru(ad)o¹¹ la reloj estis disŝirataj¹² de laboristoj. Kiam pro-

fesoro de la veterinara¹⁸ (alt)lernejo en Dresden intencis¹⁴ informi kunvenon de urbanoj¹⁵ pri la danĝeroj de la nove (el)trovitaj¹⁶ trihinoj, oni jetis al li bierglas-felt(aĵ)ojn¹⁷, tiel ke li devis forkuri¹⁸. Ankaŭ la unua pluvombrelo antaŭ preskaŭ ducent jaroj travivis¹⁹ la batalon de l' malnov(aĵ)o²⁰ kontraŭ²¹ la nov(aĵ)o, de l' kutim(aĵ)o kontraŭ la nekutim(aĵ)o. La anglo Jonas Hanway el Portsmouth dum²² siaj vastaj mondvojaĝoj ekkonis²³ la en Ĥinujo²⁴ kaj Japanujo uzatan²⁵ ombrelon kaj ne volis reteni²⁶ la profitojn²⁷ de tiu ŝirmaparato²⁸ de siaj samlandanoj. Kiam ĉe²⁹ pluvego li unufoje³⁰ vidigis sin³¹ kun malfaldita ombrelo, la fenestroj estis rapide malferm(eg)ataj³² kaj plenokupataj de sci(vol)emuloj; sur³³ la strato la homoj kunariĝis³⁴ kaj fingre montris al³⁵ li kvazaŭ³⁶ (al) frenezulo. Batalemuloj ekprenis koton³⁷ kaj ŝtonojn kaj jetis ilin al la ekzaltita³⁸ ombrelŝirmo³⁸. Sed la ombrelposedanto per ĉi tiu malmulte kuraĝiganta travivaĵo ne lasis sin deteni, dum la plej proksima³⁹ pluvo denove promenadi kun⁴⁰ la kurioza⁴¹ tegmento. Iom post iom la angloj (al)kutimiĝis⁴² al la aspekto⁴³; la kuraĝa⁴⁴ viro eĉ trovis imitantojn, kaj tiel⁴⁵ la pruvombrelo ekhavis⁴⁶ hejmon⁴⁶ en Anglujo. De⁴⁷ la insulregno ĝi entreprenis⁴⁸ sian triumfkuron⁴⁹ tra la tuta mondo. — Kaj Esperanto?

Anmerkungen

1. Auch: pasinta, iama, estinta; nicht: pli antaŭa. — 2. Auch: novigo; nicht novego = Neu(beschaffen)sein, Neuheit. — 3. Besser: eĉ = „sogar, auch“ als ankaŭ = ebenfalls, auch. — 4. Se = falls, wenn; hier nicht: kiam = zu der Zeit wo, wenn (= wann). — 5. Nicht: montri zeigen, zur Schau tragen. — 6. Progreso en (la) kulturo ist nicht falsch, aber unnötig lang. Vgl.: samformataj turismaj gvidfolioj = Führerblätter für den Reiseverkehr in Einheitsformat. — 7. Auch Tätigkeitsform: Oni rigardis kaj akceptis la plej multajn novaĵojn. Nicht: estis rigarditaj = waren angesehen worden. — 8. Nicht: envia von envio Neid, Mißgunst; auch nicht: ĵaluza von ĵaluzo Eifersucht, Mißgunst. — 9. Ich halte auch für angängig: La vaporboato estis surĵetata per ŝtonoj, obgleich das wörtlich genommen hieße: Das Dampfboot wurde daraufgeworfen vermittels Steine. Man beachte: Mi jetas sur la vaporboaton. Ich werfe (irgendetwas) auf das Dampfboot = Mi surĵetas sur la vaporboaton = Mi surĵetas la vaporboaton (Wenfall an Stelle des: sur la vaporboaton). Ich bewerfe das Dampfboot (wie: Mi suriras la herbejon. Ich betrete die Wiese). La v. estas surĵetata. Das D. wird beworfen. „Steine“ ist dann das Mittel, mit dem man bewirft = per ŝtonoj. Ebenso: La vojetoj estis sursutitaj per kolora sablo (Kabe, La Faraono); floroj surversitaj per akvo; la superstreĉito der Überspannte, s. 38. — 10. Auch: okaze de, heber nicht: dum = während. — 11. Nicht: konstruaĵo = Gebäude (Bau-Sache), Bau. — 12. Auch: de-, elŝirataj; forigataj ist zu farblos. — 13. Auch: bestkurac(ad)a, bestmedicina, aber nicht: bestmedikamenta. — 14. Auch: estis informonta. — 15. Burĝo betont zu sehr den Gegensatz zu „Proletarier“; falsch: burĝano. — 16. Nicht: elpensi = erdenken, erfinden, entdecken. — 17. Denkrichtiger: bierglas — als bloßes Bier. — Felt(aĵ)o gibt den Be-

griff „Filtz“ genauer wieder als submetaĵo Unter-setzer oder subtelero. — 18. Lieber: forkuri als das Neuwort fugi. — 19. Auch: sperti; nicht: ĝisvivi leben bis, erleben. — 20. Das deutsche sächliche hauptwörtlich gebrauchte Eigenschaftswort kann gegeben werden durch: -aĵo, -o (wenn kein Mißverständnis zu befürchten ist; man bedenke, daß -o nicht nur -aĵo, sondern auch -eco ersetzen kann), ferner durch -a, wenn das Sächliche aus Sinn oder Zusammenhang leicht zu erschließen ist (oft ist dann afero hinzuzudenken. Beachte: io, ĉio, nenio malnova usw.). Malnovem(ec)o würde hier „Neigung“ zum Alten unnötig betonen. — 21. Nach kontraŭ setze man den Wenfall nur dann, wenn der Bewegung gegen etwas hin ganz besonderer Nachdruck gegeben werden soll (z. B. La pluvo plaŭdas kontraŭ la fenestron. — 22. Auch: en, aber nicht: sur. — 23. Genauer wäre: estis ekkoninta, doch führt auch die bloße -is-Form hier zu keinem Mißverständnis. Auch: kon(ant)igi ion etwas kennen lernen (= kennend werden); aber hier lieber nicht: kon(at)igi kun bekannt werden mit (= zu einem „gekannten“ werden zusammen mit ...), kennen lernen. — 24. Ĉinujo und Ĥinujo. — 25. „Gebräuchlich“ = der gebraucht wurde (nicht: der [früher] gebraucht worden war), darum uzata, nicht uzita. — 26. Auch: ne nedoni al; weniger treffend: kaŝi (malkonigi) ion al iu verbergen, vorenthalten. — 27. Auch: utilo, aber nicht prefero = Vorzug. — 28. Auch: ŝirmilo, -aĵo; ŝirmekip(aĵ)o dürfte zu gewichtig sein. — 29. Auch: dum. — 30. Auch: la unuan fojon, je la unua fojo. — 31. Besser als: vidigis = wurde sichtbar, weil es sich hier um das Versetztwerden in den Zustand „gesehen“ willkürlich durch sich selbst handelt. Auch: montris sin, aber nicht: montrigis sin. — 32. Auch malfermegataj, „aufmachen“ handelt. — 33. Auch: en. — 34. Auch: amasiĝi. — 35. Nicht: sur lin. — 36. Auch: kiel. Nicht: Ĉu?, li estu (= sein soll) frenezulo; wohl aber, wenn auch unnötig lang: kvazaŭ li estus frenezulo. — 37. Auch: malpuraĵo. — 38. Das doppel-sinnige „der Überspannte“ läßt sich im Esperanto nicht durch ein Wort wiedergeben; vielleicht tut man am besten, beide Auffassungsmöglichkeiten zugleich auszudrücken, also wie im Texte, oder: al la ombrelŝirmo ekzaltito. Zu „superstreĉito der Überspannte“ vgl. 9. Die Formen -ant(int, ont)ulo und -at(it, ot)ulo statt -ant(int, ont)o und -at(it, ot)o vermeide man, weil einfaches -anto und -ato usw. schon die Person bezeichnet. — 39. Auch: posta, aber nicht: venonta = der (später) kommen wird. — 40. Nicht: per = vermittels. — 41. Auch: stranga. — 42. Auch: (ek)kutimis; nicht: kutimis sin. — 43. Auch: spektaklo. — 44. Auch: maltimema, sentima (= sentimo). — 45. Auch: tiamaniere; besser nicht tiel-maniere (= tielamaniere), denn tiela für tia (ebenso tiela für tiel) sollte man nur anwenden, wenn man den Begriff „derartig“ in besonderem Maße verstärken zu müssen glaubt. — 46. Auch: fariĝi kutimo, ĝeneraligi, enuzigi; wohl auch: enradikiĝi, aber nicht: regnaniĝi = Reichsangehöriger werden, naturalisiert werden. — 47. Auch doppeltes Verhältnisswort: de sur. — 48. Auch: komenci. — 49. Wohl auch: venkvojaĝo, ekiris sian triumfojon, venke ekkuradis.

Esperanto-Praktiko

Instrua kaj literatura gazeto por perfektigo en la Lingvo Internacia

6 a Jaro
Noj. 10-11 (70-71)

Fondinto kaj Ĉefredaktoro: Friedrich Ellersiek
Respondeca redaktoro: Arnold Behrendt

Oktobro-Novembro
1924

Interrilatoj de la antikva kaj la moderna kulturoj*)

De Dro J. Penndorf

„Aŭtuno — dimanĉa mateno en urbeto lokita apud la Rhein-rivero. La vinbera rikolto estas portita hejmen, kaj la vinkulturistoj estas kunvenintaj en la preĝejo pro dankema diservo. La bruado de la sonoriloj kaj de la orgeno ĵus preterpasis; nun la pastro ekpredikas laŭtvoĉe kaj kortuŝe“.

Jen — pere de nia fantazio evoluas vigla bildo, kvankam desegnita nur per malmultaj strekoj, bildo el tiu regiono de nia patrolando, kiu treege entuziasmigis niajn animojn, precipe en ĉi tiu tempo de malpaco kaj de malamikaj agoj. Nia Rhein, nia vino! Tio sonas tiel kare, tiel intime, tiel germane. Ĉu vi suspektas, ke en la citita bildo gravaj trajtoj vere estas antikvaj? Oni eble trovos antikvaĵojn eĉ en la unuaj vortoj, per kiuj mi komencis priskribi.

„De la aŭtuno nek la nomon nek la donacojn ili konas“ — raportas pri niaj prauloj la sprita romana aŭtoro Cornelius Tacitus en sia ŝatinda verketo, titolita „Germania“, (ĉap. 26), kiun li eldonis ĉirkaŭ la jaro 100 p. Kr. Fakte iam en Germanujo la aŭtuno ne jam elŝutis siajn benaĵojn, kaj pro tio ankaŭ la nomo de ĉi tiu sezono povis mal esti en nia lingvo. La germana vorto *Herbst*, antaŭe *Herbist*, estas konforma al la latina radikoj *carp-*, kiu signifas „deŝiri kaj kolekti fruktojn“.

Do, kiu alportis al ni la aŭtunajn donojn? Fremdlandaj viroj venis el la sudo trans la Alpojn, ne por feliĉigi kaj pliriĉigi niajn prapatrojn per la havaĵoj de sia hejmlando; militprete, akireme kaj teravide enmarsis paŝege kaj pezege la legioj de l'Romanoj. Tamen samtempe ili importis ankaŭ belegajn aĵojn, kiujn ili jam delonge tiel estimegis, ke ili ne volis malhavi ilin eĉ sur militakirita teritorio. Poste, kiam niaj prauloj sukcese liberigis sin de la fremda jugo, la restaĵoj de la romana influo estiĝis niaj propraj, tiamaniere ke ni iom post iom forĝis ilian fremdan devenon, interalie ĉiuj fruktaroj, nome la noblaj pomoj kaj piroj, la belegaj persikoj kaj abrikotoj, la sukplenaĵoj kaj ĉerizoj.

Tion klarigas al kompetentulo la lingvo mem. Ĉar ekz. la vorto ĉerizo, identa al la franca, itala esprimoj kaj ankaŭ al nia germana *Kirsche*, dialekte

*) Kiu intencas, studi ĉi tiun gravan problemon, tiu legu la popularan, tre interesan kaj riĉenhavan libreton „Deutschum und Antike“ (Germaneco kaj antikveco) de E. Stemplinger kaj H. Lamer (689 a volumeto de la kolektaĵo „Aus Natur und Geisteswelt“ (El naturo kaj spirita mondo) Leipzig-Berlin, Teubner 1920).

Kers, laŭ la origina greka termino *kérasos* devenas el la greka kolonio kaj havenurbo „Kerasus“ sur la suda bordo de la Nigra Maro. Kaj antaŭ ĉio la vino — nia „germana“ vino. Ne hazarde samsonas la esprimoj germana-angla (*Wein, wine*), franca *vin*, itala (kaj Esperanta) *vino*. Estas ja vere la sama vorto kaŭze de la sama objekto. Ĉar la vinberujo kaj ĝia produktaĵo estis hejmaj iam en Grekujo kaj Italujo, nur poste translokitaj de tie en nordlandojn. Kaj la honesta „vinisto“ sin nomas ankoraŭ nuntempe laŭ la latina termino *vinitor*, kiun nia lingvo iomete germanigis (*Winzer*), ne anstataŭigis per vorto vere germana.

Nun ni konsideru la „germanan“ Rhein-on. Ĉu ne estas strange, ke ni ĝin skribas laŭ greka maniero (*Rhein*), kiel ekz. rombo (*Rhombus*), ritmo (*Rhythmus*), reŭmatismo (*Rheumatismus*)? La nomo mem estas radike kelta.

Plue, kion ni juĝas pri „urbeto“?

„Ke la germanaj gentoj ne konas urbojn, ke ili ne ŝatas eĉ kunigitajn loĝejojn, estas konata al ĉiuj“ — atestas la supre citita Tacitus (Germania, ĉap. 16). Kontraŭe, kie ajn fonto aŭ kampo aŭ arbareto ekplaĉis, tie pratempe unu familio loĝiĝis. Dum jarcentoj ili nepre abomenis urbojn kiel tombejojn, ĉirkaŭitajn per muroj. Sed daŭre de la prosperanta mezepoko vilaĝoj etendiĝis kaj plimultiĝis tra la vasta pejzaĝo; krome kasteloj estiĝis sur montoj kaj montetoj. Aliflanke ĉe la randoj de la imperio, la Romanoj antaŭe jam estis konstruintaj multe da urboj, laŭlonge de Donau [Danubo] (Wien, Passau, Regensburg), de Rhein (Straßburg, Mainz, Koblenz, Bonn, Köln, Xanten) kaj de Mosel (Trier). Ĉi tiuj iam romanaj urboj unue renaskiĝis kaj ekprosperis (ekz. Worms, Speier). Do urba kulturo tie estas mil jarojn pli maljuna ol en la interna Germanujo. Ni laŭkutime titolas la reĝon Heinrich (Henriko) I. „urbofondanto“, sed Augsburg kaj Trier per iliaj originaj nomoj (*Augusta Vindelicorum* kaj *Augusta Treverorum*) memorigas pri ilia unua kreinto, nome la imperiestro Augustus.

Cetere nia vorto *Kaiser* ne estas pure germana, sed la ĝuste prononcata nomo de la plej granda Romano, Julius Caesar.

Rilate al dimanĉo — ĉu io antikva enestas? Certe. Ni ja ĉiuj lernis la trian ordonon religian: „sanktigu la festotagon!“ Same ni konas la institucion de la Hebreoj: „Memoru la sabaton, por ke vi sanktigu ĝin!“ Ses tagojn laboru kaj prizorgu ĉiujn aferojn; sed la sepa estas sabato de Disinjoro; tiam nenion faru, nek vi nek filo nek iu familiano“ (II. Mos. 20, 8—10). Do al Moses, la antikva leĝdoninto de la Judoj, ni ŝuldas la benplenan

aranĝon, ke laŭregule post po ses labortagoj okazu paŭzo, por ripozi. Aliloke la sklavo kaj laboristo ne ĝuis tian agrablon; senĉese ili devis labori kaj peni.

Kvankam ankoraŭ la romana poeto Horatius, samtempulo de Augustus kaj Jesuo, mokas pri la sabataj ceremonioj de la Hebreoj, tamen de la Judoj baldaŭ la Kristanoj akceptis la kutimon, rezervi ĉiun sepan tagon, por preĝi kaj ripozi. Sed ili anstataŭigis sabaton per dimanĉo — laŭ la ordinara opinio tial, ke je ĉi tiu tago la dia savinto sin eklevis el la tombo. Fakte la franca-Esperanta vorto „dimanĉo“ devenas el la latina lingvo: *dominica dies* estas la „tago de l' Sinjoro“. Sed kion signifas la germana esprimo sun-tago (*Sonntag*)?

La septaga semajno (kiel kvarono de la luna ĉirkaŭmoviĝo) estas fiksita de la praantikvaj Babilonaj astronomoj kaj nomita laŭ la sep planedoj tiam konataj; sed inter ili troviĝas ankaŭ luno kaj suno. Ĉi tiujn oni rigardis kiel demonojn. La suno estas kvazaŭ la ĉefo — ne mirige; ĉar laŭ la scienca esploro, la tero ja estas nur malgranda ero, deveninta el la sunĝlobo. Kiel jam en pratempoj la homoj respektplenaj preĝante levis la manojn al la suno, videble donacanta lumon, varmon, vivon, tiel ankaŭ dum la epoko de la romanaj imperiestroj pli kaj pli ĝenerale oni kredis je unu ĉionpova kaj ĉionrega dio, nome la suno. La imperiestroj mem favoris ĉi tiun kredon kaj de post Nero volonte igis sin figuri kun la lumradianta glorkrono de la suna dio, kies surteraj reprezentantoj ili volis esti, kaj al si atribuis lian kromnomon „la nevenkebla“. *Sol invictus* (t. e. la neniam venkita kaj venkota suna heroo), jen la devizo de iu nova religio orienta, speciale persa. Tiun sunan kulton romanaj soldatoj ekkonis en orientlandoj kaj disvastigis ĝin poste laŭlonge de Donau kaj Rhein ĝis la skotaj montoj. Samtempe kun la kristanismo ankaŭ la Mithras-kulto komencis sian triumfan propagandon, plej sukcese en la tria jarcento, tiamaniere, ke kelkfoje ŝajnis dube, ĉu Kristo aŭ Mithras estus la estonta registro de la homaro. Kaj kie ni povas trovi nuntempe restarigitan kapelon de tiu sundio? Sur germana terfundo apud la Saalburg-a kastelo supre de Homburg v. d. H. Kompreneble al la sundio la unua semajna tago estis sanktigita, kaj pro tio ĝisnun ni festas ĉiun suntagon aŭ dimanĉon.

Sed dimanĉan festecon karakterizas precipe bruantaj sonoriloj kaj orgeno. De kie devenas la orgeno?

Dum la lastaj jarcentoj antaŭ Kristo, Aleksandrio en Egiptujo estis ne nur la centra loko de la sciencaj studoj, sed ankaŭ de la teknikaj artoj. Tie tiam iu majstro, nome Ktesibios, konstruis muzikinstrumenton grandegan. Ĝi estis sonigata ne per pulmoforto, kiel la ceteraj flutoj ĝis tiam uzataj, sed laŭ maŝina maniero per akva premo la aero estis puŝata en la fajfilojn. Tiuj ĉi estis tiel ampleksaj, ke homaj fingroj ne kapablis fermi la aertruojn. Pro tio la inĝeniero sprite elpensis sistemon de kovriloj moveblaj aŭ klapoj, por laŭbezzone malfermi la fajftruojn per ŝlosiloj. Ĉi tiu eksternorma aparato laŭtege sonanta sufiĉe superis la bruadon de dekmiloj, da rigardantoj okaze de la antikvaj teatraĵoj aŭ gimnastaj konkursoj. Oni ĝin

nomis simple „organon“ (t. e. ilo), kio estigis nian vorton „orgeno“, laŭ latina traduko *instrumentum*. La sistemo de tiuj ŝlosiloj (latine *claves* = klavoj) prezentas klavaron. Poste oni iomete plibonigis la instrumenton, enpuŝante la aeron en la fajfilojn ne per akvopremo sed per bloviloj. Tian ilon akceptis la kristanoj por siaj preĝejoj kaj konservis ĝin ĝisnun preskaŭ en ĝia origina formo. Sekve ĝi estas same nomata en malsamaj lingvoj kulturaj. Do en ĉiu preĝejo eŭropa, amerika, aŭstralia staras nun monumento de tiu granda teknikisto aleksandriana, nome la orgeno.

Eĉ la preĝejoj mem kun altaroj, pastroj kaj parohestroj, iliaj talaroj, la predikoj kaj la konvenaj gestoj estas antikve nomitaj. Sed krom ĉi tiuj nomoj devenas el la antikveco ankaŭ tio, kio estas predikata: la doktrino kristana, la evangelio (t. e. agrabla sciigo), publikigita unue dum la regado de la romana imperiestro Tiberius, anoncita en greka lingvo al la orienta homaro, en latina al la okcidenta, tiaforme perigita ankaŭ al niaj prauloj, per la reformacio enigita en germanan vestaĵon, — sed la spirito restas antikva. Ĉar la greka filozofio efike trafenetris la simplajn instruojn de la Savinto kaj helpis starigi la dogmojn.

Certe, la greka dio *Zeus* de Olimpo jam estas mortinta, mortinta *Jupiter*, „la plej bona, la plej granda“ dio de la Romanoj, mortintaj kaj senvivaj la keltaj dioj de la nunaj Francujo kaj Britujo, sed ankaŭ niaj *Wodan* kaj *Tor*. Ni ne havas religion nepre germanan; tion ni ofte forgesas. Cetero, ni Germanoj ne solaj submetis nin al fremda, antikva religio; sed tion faris ankaŭ la Francoj, Angloj, Rusoj, resume ĉiuj en Eŭropo kaj multaj ekster nia kontinento. Por ĉi ĉiuj valoras la fama sentenco de la mortanta imperiestro Julianus: „Finfine venkis vi, Galileano!“

Sed ĉu vere ni fariĝis intime spertaj pri ĉiuj detaloj de la kristana doktrino? Nu, ni imitu la ekzemplon de Dro Faŭst kaj malfermu la sanktan novan testamenton (ankaŭ latina termino, malfacile klarigebla)! Jen: „Komence estis la vorto, kaj la vorto estis ĉe Dio, kaj Dia estis la vorto.“ Ĉu vi tion komprenas? Tute ne, — se vi sincere respondas. Do ni ne penu, alie traduki la teksteron, sed konstatu: ĉi tion oni ja neniel povas kompreni, se oni ne scias, kion la origina greka esprimo (*logos* = vorto) povas signifi kaj en ĉi tiu kazo signififu laŭ la intenco de l' aŭtoro. Mi ne estas pri-traktanta detale ĉi tiun temon. Sed kiu volas memstare prijuĝi tiajn problemojn, tiu devas esti instruita pri la religiaj meditadoj kaj sentado en la unuaj jarcentoj post Kristo.

Plue oni memoru, ke kelkaj nekulturitaj gentoj havas la kutimon, festene konsumi la bestan fetiĉon, por ke — laŭ ilia opinio — la superaj fortoj de la adorita besto transiru en la manĝantojn. Simile ĉe la Grekoj okaze de la famaj misteraĵoj interalie la kredemuloj manĝis solene la sanktan greneron kaj gustumis miksitajn trinkaĵojn. Ĉu ne estas verŝajne, ke tiaj praaj primitivaj ideoj iel kunigis kun la simpla memoriga festeno aranĝita de nia majstro? Nur la sufiĉe informita saĝulo kapablos diferencigi la kernon kaj la ĉirkaŭaĵon de la sakramento. Li ne sin kroĉas al dogmoj, ritoj, ceremonioj, parte jam ne kompreneblaj, sed li

esploras la fundamentan veron de la kristaneco, kiu espereble estas liberigonta la homaron de reciproka malamikeco kaj malamo internacia. Ni nur priatentu la simplan ordonon: „Amu vian proksimulon kiel vin mem!“ Jen, ekaperas ankaŭ la „interna ideo“ de l' Esperantismo.

Prilingvaj Diskutoj

Brodcasti aŭ disaŭdigi?

Niaj anglaj samideanoj „brodkastas“, ni germanlingvanoj ĝis nun preferis „radie disaŭdigi“ Esperantajojn! En E. T. n-ro 209 H. E. Epton defendas la vorton brodkasti skribante jenon:

Oni informis min, ke la germanoj malŝatas la vorton „brodkasti“, ĉar la vorto ĉe ili signifas „pankesto“, kaj preferas la kunmetitan vorton „disaŭdigi“, kiun vorton mi iam vidis en ET kaj aliaj gazetoj.

Tiu lasta estas tute malbela kaj nevera vorto, ĉar ĝi ne klarigas ĝuste tion, kio vere okazas, kiam radio-stacio elsendas signalojn. La fakto, ke stacio elsendas signalojn, ne signifas, ke tiuj signaloj estas aŭdataj! En multaj lokoj ili ne estas aŭdataj; tio dependas de la distanco kaj forto de la ricevaparato. Do, disaŭdigi estas malĝusta.

Oni povus diri dissendi aŭ disvastigi, sed tiaj kunmetaĵoj estas malbelaj kaj ne uzindaj; same kiel la malnova negativa vorto „senfadeno“ (wireless — t. s. f.) anstataŭ la moderna vorto „radio“. Broadcasting estas vorto, kiu nun estas preskaŭ universala, certe multaj lingvoj enkorpiĝis ĝin en siajn vortarojn, eĉ sensange, kaj ĉar tiu vorto havas sencon, kiu ne estas ĝuste tradukebla en aliaj lingvoj, ĝi estas la plej bona vorto por Esperanto. Malgraŭ ĝia eble neagraba senco germana, mi opinias, ke ĝi kaj ne alia vorto devus esti la vorto uzata en Esperanto. Ne forgesu, ke en Esperanto estas multaj vortoj, kiuj estas malagrablaj al la oreloj de iuj nacioj, kaj se oni elprenas el Esp. ĉiun tian vorton, nia vortaro eble fariĝus nur skeleto!

La fakto, ke „brodkasti“ memorigas pri „Brodkasten“ (germana pankesto), laŭ mia opinio ne influas aŭ ne influu la elekton de teknika esprimo. Tiurilate mi konsentas kun s-ro Epton. Sed — ĉu la sendataj signaloj ktp. estas aŭdataj ĉu ne, ankaŭ estu indiferente por la vortelekto. Ĉar — se mi ion diskonigas per gazetoj, tio ja ne signifas, ke ĝi estos konata! Kelkaj aŭdos, kelkaj konos; certe, ke ĉiuj konos mian informon, ne ekzistas. Ĉu oni konos mian informon, tio dependas de la atento flanke de la legantaro! Kial kunmetaĵoj, ekz. dissendi aŭ disvastigi, estas malbelaj kaj ne uzindaj? La vorto „senfadeno“ tute ne estas anstataŭigita per la vorto „radio“. La sencenhavo de la du vortoj treege interdiferencas. La tekniko

certe bezonos ankaŭ estonte la esprimon „senfadeno“ (senfadeno ne estas klare komprenebla vorto) kaj krome uzos „radia“. La esprimo „radio“ estas ĝenerale kaj — laŭ mia opinio — rajte uzata por ĝenerala ideo. Dissendi kaj disvastigi estas nepre bonaj kunmetaĵoj, sed ili ne trafas la celon tiel bone, kiel la vorto „disaŭdigi“. Radiado estas prefere direktata al la aŭdsento. Se mi disaŭdigas ion, mi deziras, ke oni aŭdu ĝin. Aŭdado efektive okazas ĉe radiado. Ĉu fakte aŭdas ĉiuj, estas indiferente, ŝajnas al mi. Kial ni traduku la anglan vorton „broadcasting“? Ni esprimu per fundamenta vorto, kion ni celas. La argumentado de s-ro Epton estus atentinda, se la vorto „disaŭdigi“ kaŭzus erarkomprenon. Mi ne vidas tian eblecon. Cetere — en Genève oni aprobis „disaŭdigi“, kaj „broadcasting“ tute ne estas preskaŭ universala; ekz. inter germanlingvanoj oni ne komprenas la vortenhavon, se oni ne estas teknikisto kaj legas anglajn radiojurnalojn. Mi nepre pledas por tio, ke oni „disaŭdigu“ radie. Strange, ke s-ro Epton ne montris la solan argumenton, kiu estas defendebla: brodkasti = radie disaŭdigi, unu vorto anstataŭ du! Sed — elektante esprimon mi ŝatas esti fundamentano kaj ne aritmetikisto!

Behrendt

Akcepti aŭ Ricevi?

Laŭ mia lingva sento mi preferas diri akcepti (ilo ktp.) anstataŭ ricevi (ilo ktp.); mi miras, ke mi trovas en ĉiuj artikoloj kaj vortaroj pri la radio-telefono nur la lastenomitajn radikojn. Ĉu akcepti ne estas pli konforma?

Leono Funken

Sidante kun aŭdiloj sur la oreloj, ĉu mi akceptas aŭ ricevas tion, kion la sendstacio disaŭdigas? Mi preferas „ricevi“. Akcepti havas — laŭ mia lingva sento — aktivan, kaj ricevi havas pasivan sencon, t. e. mi akceptas, kion mi volas, kion mi ankaŭ povas malakcepti, sed mi ricevas, kion oni sendas, ĉu mi povas „malricevi“? Kreinte la kondiĉojn por akceptado aŭ ricevado, t. e. surmetinte la aŭdilojn, mi ne plu povas influu la sendaĵojn. Imagu: Mi deziras aŭdi E-kurson, la parolonto malsaniĝis, kaj mi aŭdas la anoncon, ke fabelrakontado anstataŭos la E-kurson. Mi eble formetos la aŭdilojn. Sed nun ne plu ekzistas la kondiĉoj por akceptado aŭ ricevado. Sed havante tiajn kondiĉojn, mi devas aŭdi tion, kion oni sendas. Al tia situacio respondas „ricevi“.

Behrendt

Vi parolas pri centmiloj da Esperantistoj.

U. E. A. bezonas dek mil membrojn.

Aliĝu al U. E. A.!